Ĉe la Vojnodo

A la croisée des chemins

Vi estos bonvena ĉe La Vojnodo
dimanĉon la 3ªn de junio 1990
pro la oficiala inaŭguro
de nia nova internacia esperanto-centro,
kie ni celas spiritan kreskon individuan
kune kun la aliaj, en harmonio kun la naturo.

PROGRAMO

10h00 saluto de la urbaj aŭtoritatoj de Hastière
alparolo de Joseph Famerée,
prezidanto de la kooperativo de La Vojnodo
10h30 festparolado de Giorgio Silfer
prezidanto de la kooperativo de Literatura Foiro
11h00 vizito de la esperanto-centro
12h00 aperitivo kaj bufedo
14h00 promenado en la ĉirkaŭaĵo
sub la gvido de Catherine Samain
(surhavi ŝuojn taŭgajn por arbaro)
18h30 komuna vespermanĝo
20h30 recitalo de Nikolin'
21h30 holofonia muziko
zorge de Georgia Henningsen kaj Joseph Famerée
22h30 laŭrivera piroteknikaĵo

Eblos tranokti en La Vojnodo mem, senpage se tendume, po 225 BEF se en komforta amasloĝejo: ambaŭkaze necesos kunporti dormosakon. Matenmanĝon vi povos ricevi kontraŭ 120 BEF.
Se vi ĉeestos jam sabaton vespere, vi povos spekti en la loka kinejo la filmon *La viro ĉe la vojnodo* (De Wisselwachter), de la nederlanda reĝisoro Jos Stelling, signalitan ĉe la Venecia Kinfestivalo 1986.
La aliĝo al la dimanĉa programo kostas 500 BEF. La kotizo inkluzivas aperitivon, kafon, tizanon, ceteraj trinkajoj estas pagendaj aparte.

Ĉe la vojnodo
Moulin de l'Herméton 68
B-5540 Hastière
tel. (32)82-644986 81-210102